

# KOMENCANTO

*revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



Alja Sadretdinova (8 jaroj) [Voroneĵ, Rusio]

2005

Kiel Michel Duc Goninaz, prezidanto de Franca Esperanto-Instituto iĝis esperantisto — verkoj de niaj legantoj — diversaj ondoj de bunta mondo gramatiko serioze kaj amuze — aforismoj — anekdotoj — la praktiko ripozejo — korespondu!

6

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

**Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

**Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

**Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

**Britio** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carlisle, ML8 4QT

**Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strĥznice

**Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

**Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

**Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

**Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

**Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

**Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seegeer-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

**Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

**Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

**Italio, Kroatio, Slovenio** Viŝnja Brankoviĉ

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

**Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

**Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

**Kubo** Lazaro Azcuy Ravclo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

**Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

**Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

**Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

**Portugallio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

**Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckeavagen 29, SE — 24294 Horby

**Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

**Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

## Redakcie

Karaj legantoj!

En la tagoj, kiam baldaŭ finiĝos la jaro 2005, ni retrorigardas nian dumjaran laboron, analizas niajn sukcesojn kaj malsukcesojn, kaj invitas ankaŭ ĉiujn vin skribi opiniojn pri ĉi-jara kolekto de nia revuo, fari rimarkojn, sugesti, kion eblas plibonigi.

Ni ŝatas danki ĉiujn, kiuj partoprenis en kreado de ĉi-jara "Komencanto", ĉiujn, kiuj kontribuis, verkis, ne ŝparis por ni trafajn proponojn kaj sugestojn. Viaj kuraĝigaj leteroj, en kiuj vi informis nin pri plej ŝatataj paĝoj de la revuo en via E-rondo, tre subtenis nin. Ni opinias, ke kune ni sukcesis krei apartan, intiman etoson en la revuo, fari ĝin varieca, riĉa de multaj utilaj scioj, praktikaj ekzemploj, informoj, kaj bonhumorigaj distraĵoj.

Ankaŭ tiu ĉi numero enhavas plurajn interesajn materialojn por kontentigi diversajn gustojn. En rubriko "Kiel tio komenciĝis" pri kialoj kaj kondiĉoj de sia esperantistiĝo rakontas elstara kaj vaste konata esperantisto, prezidanto de Franca Esperanto-Instituto Michel Duc Goninaz. Ni mem miras, ke el tiom da aperigitaj en la rubriko rakontoj, neniu historio iel ripetis la alian, ĉiuj rakontoj estas tiom malsamaj!

Estas tute nature, ke sojle de Novjarko, oni ĉiam deziras ion fabelan kaj atendas miraklojn, tial verŝajne multaj plezure legos la fabelon de jam konata al vi aŭtoro el Francio Yves Brusq, pri neatendita realiĝo de deziroj, kaj tre kortuŝan debutan rakonton de Belenko Anĵela el Rusio. Krome, en rubriko "Verkoj de niaj legantoj" vi povas legi versaĵojn de diversaj aŭtoroj, dediĉitajn al vintro kaj Novjarko.

Sur gramatikaj paĝoj ekde tiu ĉi numero ni komencas aperigi serion de artikoloj "Proverboj por komencantoj", proponitan de Johan'-Luko Tortel el Francio, kiu havas viglan stilon kaj estos facile legebla de novuloj.

Ni penas lastatempe doni pli da atento al ebloj de praktika utiligo de Esperanto. Ĉi foje vi povas legi interesan materialon pri praktikaj paŝoj de Flavio Rebelo el Brazilo, kiuj fariĝis furoraj projektoj en Esperantujo.

En rubriko "Diversaj ondoj el bunta mondo" ni konigas al vi ankoraŭ unu parteton de kolorriĉa japana kulturo.

Finiĝas la jaro 2005, kiu estis ne tre facila por la redakcio. Do, ni laboris en ne tre favoraj kondiĉoj kaj travivis premantan situacion. Ni dankas vin, niaj legantoj, pro pacienco kaj komprenemo, pro via subteno per ideoj kaj per monrimedoj. Ĉio ĉi helpas ne perdi kuraĝon kaj memfidon, donas forton por daŭrigi la aferon. Ni bezonas viajn daŭrajn apogojn! Kun espero ni bonvenigas la Novan jaron, ĝi estu por ni ĉiuj pli sukcesa kaj plena je amo, ĝojo kaj prospero!

Redakcianoj de "K"

## KOMENCANTO

2005 numero 6 // (56) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavec

konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavec

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2005:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 180 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

*Michel Duc Goninaz estas emerita docento de la Provenca Universitato, kie li instruis la rusan lingvon kaj Esperanton. Li i.a. gvidis la revizion de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto por la novaj eldonoj de 2002 kaj 2005. Estas eldonitaj liaj esperantlingvaj tradukoj de La Fremdulo (Albert Camus) kaj Songonovelo (Arthur Schnitzler). Li estas membro de la Akademio de Esperanto kaj de Franca Esperanto-Instituto, kiun li prezidas dum la periodo 2004-2007.*

## ...Mi estas esperantisto, adepto samtempe de komuna homa lingvo kaj de egaleco inter ĉiuj lingvoj de ĉiuj popoloj



**K**iel tio komenciĝis? Por respondi tiun demandon, ne sufiĉas rakonti personajn rememorojn kaj paroli pri Esperanto. Necesas ja kompreni historian situacion kaj la rolon de diversaj lingvoj.

**1933-40.** "Unu lingvo sufiĉas". Mi denaske vivas en unulingva medio. Mi probable eĉ ne imagas, ke ekzistas surtere aliaj lingvoj, ol tiu, kiun uzas miaj familianoj kaj ĉirkaŭaj ceteraj homoj, t.e. la franca.

**1940-44.** "Mi malkovras aliajn lingvojn, elpensas lingvon tutmondan kaj ek-

scias pri Esperanto". Alia lingvo aperas en Parizo. Ĝi estas parolata de la germanaj soldatoj. Ĝi estas skribata sur dulingvaj afiŝoj, anoncantaj la ordonojn kaj decidojn de la germana stabo. La unua fremdlingva vorto, kiun mi tiamaniere lernas, estas "Bekannt-machung", kiun mi ja ne kapablas analizi ("sci-igo"), sed kiun mi opinias tre longa kompare kun la samsignifa franclingva "Avis". Mi do konatiĝas kun tiu lingvo per la traduka metodo. Por sepjara knabo tamen restas nesolvebla problemo: homoj ja povas paroli alian lingvon, ol mi, sed en kiu lingvo ili pensas? Ŝajnas al mi neeble pensi en alia lingvo, ol la franca. Sed venas aliaj informoj per la lernejo, la radio kaj la politikaj informoj. Mi ekscias, ke ekzistas angloj, kiuj parolas angle, rusoj — ruse ktp. Iĝas pli kaj pli klare, ke mi ne povos devigi ilin paroli france. Mi eĉ malkovras, ke la mencio "Made in France", videbla sur kelkaj objektoj, estas anglalingva — kial do? Krome, mi ekscias, ke iuj homoj, kiujn mi aŭdas paroli france kaj estas konsiderataj francoj, parolas "inter si" en alia lingvo. En Parizo estas multaj

tiaj homoj, precipe bretonoj. Ankaŭ la malfeliĉaj judoj, ĉiutage insultataj de la nazia propagando kaj deportataj en 1942, havas laŭdire sian propran lingvon. Estas do ne nur multaj lingvoj, sed du specoj da ili: tiuj, kiujn oni uzas oficiale (la franca, la germana, la angla k.a.) kaj tiuj, kiujn oni uzas "inter si" (la bretona, la jida k.a.). Pro tiu revolucio en mia infaneca mondkoncepto (mi ankoraŭ ne konis la vorton Weltanschauung!), mi faras al ĉirkaŭaj plenkreskuloj la demandon: "Sed ĉu ne ekzistas iu lingvo komuna por ĉiuj homoj?" kaj mi ricevas la jenan respondon (de mia patrino, se mi ĝuste memoras): "Ho, jes, ekzistis Esperanto, sed ĝi malsukcesis". Mi ne komprenas, kiel lingvo povas "malsukcesi", ĉar nur poste mi ekscios, ke lingvoj aperas kaj malaperas. Tamen mi povas konstati, ke tiu informo estas ne tute ĝusta. En strateto tute proksima al mia lernejo troviĝas kafejo, sur kies vitrino videblas verda stelo kun la skribaĵo "Esperanto parolata". Do, ekzistas tamen homoj, kiuj uzas tiun lingvon, kiu "malsukcesis"!

Mi ne aŭdacis eniri la trinkejon por informiĝi. Finfine, tio estas problemoj por plenkreskuloj. Kaj mi ankoraŭ ne konsciis, kiom simbolaj estas miaj unuaj scioj pri fremdaj esprimoj: "Bekanntmachung", "made in France" kaj "Esperanto parolata".

**1944-46.** "Mi renkontas Esperanton". Parizo ĵus liberigis. Mi ekvizitas mezlernejon kaj devas elekti unuan fremdan lingvon. Mi elektas la germanan. Pro kio? Ĉu pro tio, ke ĝi jam ne plu estas tute fremda; aŭ pro tio, ke mia patrino siatempe lernis ĝin kaj povos min helpi; aŭ pro tio, ke ĝin elektas malplimulto (unu sesono de la lernantoj), do iaspeca elito? Mi dubas, ĉu eĉ psikanaliziisto donus taŭgan klarigon, sed nia instruisto pri la germana lingvo jene aprobas nian elekton en sia inaŭgura leciono: "Vi estas malmultaj, ĉar la germana lingvo estas malamata. Ĉar la milito ankoraŭ ne finiĝis, mi povas argumenti, ke scii la lingvon de la malamiko estas utile. Sed precipe pensu pri la estonta paco kaj via nepra estonta amikeco kun la junaj germanoj, viaj samaĝuloj, kiuj ne respondecas pri la abomenaĵoj, kiujn ni travivis aŭ pri kiujn ni ĵus eksciis." Du jarojn poste, mi eklernas la anglan. Intertempe mi, laŭ instigo de nia instruisto, korespondas dulingve kun juna germano, kiu lernas la francan lingvon. Sed okazas io alia. Mi rimarkas, ke nia instruisto pri historio kaj geografio, s-ro Robert Gérard, surportas insignon kun verda stelo. Mi

memoras pri la verda stelo kun "Esperanto parolata" kaj konjektas, ke li estas unu el la malmultaj parolantoj de tiu lingvo, kiu laŭdire "malsukcesis". Mia konjekto montriĝas ĝusta. Lun tagon li proponas, ke ni korespondu kolektive kun alilandaj klasoj por interŝanĝi informojn kaj dokumentojn pri niaj respektivaj landoj: tiu korespondado okazos en la lingvo Esperanto, kaj li klarigas al ni, kio ĝi estas. Li proponas instrui ĝin al dezirantoj, ekster la devigaj programoj. Kun kelkaj samklasanoj mi sekvas lian kurson dum du jaroj kaj eĉ trapasas la unuagradan ekzamenon de Franca Esperanto-Instituto. Ni komencas la planitan korespondadon, kreas klubon kun biblioteko, abono al *La Juna Vivo*, tiama organo de TJO (nun TEJO) ktp. Ni havas ankaŭ personajn korespondantojn. Oni hazarde atribuis al mi korespondantaron en la Finnlanda urbo Turku/Åbo. Per tiu hazardo mi eksciis, ke en tiu urbo estas uzataj du lingvoj, la finna kaj la sveda kaj

tial la urbo havas du nomojn. Pripensinda fakto, ĉu ne?

**1949.** Mi partoprenas la renkonton de TJO en Versajlo, apud Parizo. Mi parolas flue kun gejunuloj el pluraj eŭropaj landoj. La partoprenantaj junaj kimroj klarigas al ni, ke ili ja estas britoj, sed ne "angloj", kaj parolas sian propran kimran lingvon, kiun ili eĉ aŭdigas. Miaj ideoj pri la rilatoj inter lingvoj kaj politikaj fenomenoj pli kaj pli klariĝas. Unu nederlanda partoprenantino restas postkongrese unu plian semajnon en Parizo. Mi ŝin ĉiĉeronas ĉiutage. Ŝi jam bone scipovas la francan lingvon, sed ni parolas nur en nia komuna Esperanto.

Mi haltas ĉi tie. Mi povus rakonti, kiel mi fariĝis instruisto de la rusa lingvo, sed tio estus ekstertema. Tiu somero de la jaro 1949 restas por mi senŝanĝe sunoplena kaj probable pro ĝi mi estas ankoraŭ nun esperantisto, adepto samtempe de komuna homa lingvo kaj de egaleco inter ĉiuj lingvoj de ĉiuj popoloj.



Ĉi tiu versaĵkolekto de diversaj niaj aŭtoroj estas dediĉita al jarsezonoj kaj al Novjarfesto...

**Boguslav Sobol** [Milanovek, Pollando]

## Jarsezonoj

La tutan jaron  
Ĉiela Pentristo  
mirigas mondon.  
Granda Artisto!

Printempo donas  
novan esperon.  
Ĝi per verdaĵoj  
ornamas teron.

Somero ridas  
en multaj floroj,  
kaj kant' de birdoj  
ĝojigas korojn.

Oran aŭtunon  
sur la folioj  
pentras la suno  
per man' de Dio.

La vintra frosto  
skulptas fenestrojn.  
Regas fabeloj  
kaj neĝaj festoj.

P. Astafjev  
Tradukis **Tatjana Vŝivceva**  
[Miass, Rusio]

## Renkontiĝo



Plaka,  
Kraka  
Jam glaci',  
Herba plekt' en prostraci'.  
Birda vic' en fluga treno.  
Libraj paĝoj de ĉagreno.

Flua,  
Blua  
Supren fum'.  
Sur ĝardeno — prujn-kolum'.  
Blu' ĉiela nubojn disas.  
Avo Frost' Aŭtunon kisas.

**Krilova Jelena** [Ribinsk, Rusio]

...

Arĝentvintro salutas Novjaron,  
Ekludante plezure kun ĝi.  
Avo-Frosto gratulas homaron  
Prezentante donacojn de si.



pentris sur la paĝo Zinaida Vasiļjeva [Jekaterinburg, Rusio]

## Novjaraj gratuloj

de **Tatjana Vŝivceva** [Miass, Rusio]

Multan monon en babuŝon,  
Kaj bombonon en la buŝon!

Plensukceson en laboro.  
Kaj la amon en la koro!

Estu sana, estu riĉa,  
Estu ĉiam vi feliĉa!

*Kristnasko kaj Novjaro ĉiam estis ligitaj kun fabeloj, revoj... Tial ni kolektis ĉi tie kaj prezentas al vi sekvajn verkojn de niaj aŭtoroj.*

## Poetika miniaturo

el Filipp Ĵakote, esperantigis **Raja Kudrjavceva** [Jekaterinburg, Rusio]

Mi memoras malnovajn festojn, kiam infanoj solene paŝadis kun lumantaj lanternoj... Nun restis nur unu infano: malfruinta, malbrucema, obstina. Memoriganta, ke infanaĝo, tamen, ekzistas, ekzistas ankaŭ ia malkuraĝa, naiva, preskaŭ blinda ĝojo, simple ia kanteto... Jen vi aŭdas voĉon de infano, kiu je alta kaj karesa noto elbuŝigas multsonajn tamburinecajn vortojn; kaj post la vortoj – blua vintra vespero, brilanta neĝo sur branĉoj de abioj, freŝeco de vintra aero. Kaj subite vi sentas kvazaŭ vi trafis spacon de tenero, fabelan mondon, kiu - kiel sireno – vokas vin en la pasintecon, ĉirkaŭprenas vin, penas konsoli vin eĉ tiam, kiam antaŭe vin, ŝajne, atendas sole vivaj rifoj...

**Belenko Anĵela** [Novosibirsk, Rusio]

## Mia verda krokodilo

Ĉiuj krokodiloj estis ordinaraj krokodiloj, sed nur unu el ili estis iom stranga: li ŝatis florojn kaj foliojn. Foje la Krokodilo renkontis ĉarman Bovinon kaj certe tuj ekamis ŝin. Kaj la Bovino ankaŭ ekamis la Krokodilon, ĉar ili havis multon komunan kaj interesiĝis pri la samo – pri floroj kaj folioj.

— Rigardu, - diris aliaj, - rigardu! Kia li estas verdaĉa kaj fia! La Bovino enpensigis...



Venis aŭtuno. La floroj velkis kaj la folioj defalis.

— Ĉio finiĝis, - ekspiris la Bovino, - ne plu estas floroj kaj folioj...

— Ĉu por amo necesas nur floroj?! - ekkriis la Krokodilo.

— Jes. Kaj ankaŭ folioj, - mallaŭte respondis la Bovino.

Kaj tiam la Krokodilo decidis fariĝi verda folieto. Kaj li vere faris tion. Oni diras, ke la Bovino denove ekamis lin. Ĉar ne tre gravas kiel vi aspektas. Se vi amas – faru por la amanto ion agrablan!

**ESTU ALMENAŬ LA VERDA FOLIETO!**



Bildojn sendis **Izmajlova Luiza** [Kuzneck, Rusio]

Esperantigis Yves Brusq  
[Douarnenez, Francio]

## La urso de Peĉjo

— Kiomfoje mi diris al vi: ne parolu pri tiu urso? — kriis la duonpatro al Peĉjo, kvinjara knabo, lia duonfilo.

Peĉjo kuraĝe spitis al li, malgraŭ sia infana aĝo:

— Mia patro, antaŭ sia morto kaj ankaŭ mia patrino antaŭ unu jaro promesis, ke ili aĉetos al mi urson por mia naskiĝtago. Sed ĝis nun mi ne havas ĝin. Kaŭze de vi!

— Baldaŭ vi ricevos mian pugnon al via vizaĝo kaj mian piedon al la postaĵo anstataŭ la urso, - malice respondis la duonpatro.

La kompatinda knabo foriris grumbletante. — Ĉu estas senco peti urson, eĉ plej etan, de tiu ebria bestaĉo, de la viro, kiu scias nur drinki kaj bati mian patrinon kaj min, - pensis Peĉjo.

Neniam Peĉjo vidis la vivantan urson, krome nur en ludil-vendejoj, sed tiuj estis ne tiaj ursoj, kiun li volis. Ne, li volis la vivan, kaj prefere grandan urson.

Peĉjo eksidis sur la plankon por pli facile pensi. Li pensis, ke eble li povos trovi la urson ie en la domo, aŭ en la ĝardeno. Ne estus mirinde trovi urson en la ĝardeno, ĉar en la ĝardeno estas tiom multe da diversaj objektoj, kaj kiom da oni jam trovis tie.

Li ekserĉis tra la domo, ĉar estas tute klare, ke oni devas serĉi la beston tie, kie oni volas lin trovi. Sed li ne sciis, kie ĝuste troviĝas la urso. Kaj li trovis en la domo nenian urson.

“Mi iru al la ĝardeno”, - pensis Peĉjo. Kaj li denove kaj denove serĉis tie kaj tie. La serĉado mem estis por li plezuro, sed la urso troviĝis nenie.

“Kion fari?”, - pensis la knabeto. “Eble la urso estas en la flank-remizo? Mi vidu!” Ankaŭ nenio... Jen staras ĝarden-iloj, jen siteloj, kuvoj kaj aliaj aĵoj, sed neniu besto videblis.

Subite la knabo eksentis ian agrablan tuŝon, io karesis lian brakon. Li rigardis kaj ekvidis malnovan jakon, kiun iam surportis lia patro. La maniko de la vesto balanciĝis tien-reen, mole tuŝante la brakon de la knabeto. Peĉjo metis sian manon sur la veston kaj karesis ĝin tenere kaj iom timeme. La jako tremetis kaj ŝajne, plezure grumbletis, sed ne laŭte. Ho! Kiel miele bonodoris la jako!

La knabo premis la jakon sur sian brakon kaj forlasis la flankremizon. En la ĝardeno li sidis sur la gazonon. La “urso” daŭrigis obtuze grumbleti, karesante la vangon de la knabo. Peĉjo per dolĉa voĉo diris al li:

“Vi devas esti diskreta, ne tro forte bleki, vi ja ne estas sovaĝulo!”

Subite eksonis la voĉo de la brutulo:

— Kion vi faras kun tiu malpura jako?

— Tio estas mia urso, - respondis la knabo. — Lasu min en trankvilo, alie mia urso okupiĝos pri vi.

— Kion vi diris? Forĵetu tiun malpuraĵon tuj!

Peĉjo, kolerega, sinturnis al la nova amiko kaj diris:

— Ĉu vi aŭdis, Brutuso? Ataku lin!

La “urso”, eligante teruran hurlon, saltetis sur la krudulon kaj per piedbato faligis lin...



Dank'al nia Esperanto, ni ja povas riĉigi nian vivon! Malkovrante, ekzemple, kulturon de aliaj landoj kaj popoloj. Eblas fari tion korespondante kun esperanto-amikoj el diversaj partoj de la mondo, sed foj-foje ni povas bonŝanci eĉ viziti iujn belegajn kaj mirindajn lokojn kaj ĉion vidi proprao-kule.

Ni jam delonge interesiĝas pri tradiciaj hajko-poemoj, kiuj nun estas tre popularaj en la mondo. Tial ni estis feliĉaj, vojaĝante ĉi-aŭtune en Japanio cele partopreni la 92-an Japanan Esperanto-Kongreson, ĉeesti kunvenon de hajko-ŝatantoj, aŭdi verajn japanajn hajkojn kaj multajn komentojn pri tiu ĉi poezia arto. Tiuj kunvenoj de hajko-ŝatantoj okazas regule en tre ĝuinda loko – belega ĝardeno "Sankeien", en speciala konstruaĵo – Domo de Te-Ceremonio, konstruita en la 17-a jarcento. Reve belaj naturaj pejzaĝoj de la ĝardeno, regantaj ĉi tie trankvilo kaj harmonio, inklinas al poezio. Vagante ĉi tie, vi simple kunfandiĝas anime kun la naturo kaj krome povas trasantaj kaj pli bone kompreni spiriton de tiu ĉi lando.

Sur la paĝoj de nia rubriko ni prezentas rakonton pri tradicia hajko-poezio, far de instruisto de Hajko-poemoj kaj redaktoro de Hajko-revuo Sibasaki Satao (urbo Jokohamo, Japanio), kaj kelkajn hajkojn de la japanaj aŭtoroj – partoprenantoj de priskribita supre Hajko-kunveno.

*Redakcianoj de "K".*



Domo de Te-ceremonio en ĝardeno Sankeien, kie okazis Hajko-kunveno [Jokohamo, Japanio]

## Kvar sezonoj kaj hajko-poemoj

Sibasaki Satao [Jokohama, Japanio]

Oni nomas Japanion "La Lando de kvar sezonoj". Vere, Japanio estas riĉega je ĉarmoj de kvar sezonoj. Kaj tio donas al japana tradicia haiko-poemo ĝian fundamentan karakterizon.

En Japanio, la homaj vivoj estas strikte kunligitaj kun ĉiuj sezonoj respektivaj.

La hajko-poemo naskiĝis en la Erao de Muromati (1571-1653).

Tiutempe furoris "serioj de poemoj", nomataj "renga". La serio (la renga) komenciĝis per 5-7-5-silaba verso. La unuan version de la serio oni nomis "hokku", kiu signifas "la unua verso". Tiu "la unua verso" sendependiĝis de la "serio de poemoj", kiel unuopaj versoj. Tion iniciatis MATUNAGA Teitoku.

La "unua verso" devis esti "saluto respondanta al la sezono". Ĉiu "hokku" (la unua verso) devis enteni nepre vorton por esprimi "sezonan saluton". Tia kutimo devenis de la ĉiutaga vivo de japanoj, kiuj estis strikte kunligitaj kun ĉiuj sezonoj.

Tiu principo estis enkondukita ankaŭ en la modernigitan poemon nomitan "hajko-poemo".

Ankaŭ la modernaj hajko-poemoj devis principe kunhavi unu sezonan vorton. Tio estis ĉar, la moderna hajko-poemo disvolviĝis de la antaŭa "hokku" (la unua verso), kiu estis "saluto de sezono".

La buntaj koloroj de ĉiu sezono riĉigas japanajn hajko-poemojn.

La japana hajko-poemo estas kunligita kun varie allogaj kvar sezonoj.

Oni povas nomi hajko-poemon - la poemo de kvar sezonoj.

En la lasta tempo oni versas tre multe sen sezona vorto, libere de la tradicio.

Tiaj poemoj estas nomataj "liberaj hajko-poemoj" aŭ "sensezonvortaj hajko-poemoj".



# Hajkoj

## de la japanaj aŭtoroj

### en traduko de Sibayama Zyun'iti.

**SIBASAKI Satao**  
instruisto de Hajko-poemo  
redaktoro de hajko-revuo "Ajxisai"

Zumcikadetoj  
Interne de l' arbaro  
Kaskade voĉas.

Postpluve ruĝas  
balailherbaj beroj -  
jen vesto panja.

Fabeto juna  
sin formas "a" minuskle  
en vorto "panjo".

**AIDA Yayoi**

Plenrondas luno -  
De kie ĝin rigardas  
Patrin' kaj Patro?



Vesperkrepuske  
ĉiele supre punktatas  
sovaĝ - anseroj.

**TANIGAWA Hiroshi**

Plenlun' lumegas -  
Jen ĝoju kaj jen tangu,  
Vi leporetoj!

**SIBAYAMA Zyun'iti**

En ĉambr' turdoma  
plenumas lun' - nur steloj  
ali - fenestras.

Poemeto de la ĉeestanta gasto  
Wang Min Hao [Ŝanhajo, Ĉinio]

Plena luno, floro kaj bongusta sakeo,  
Bela festivalo estas la mezaŭtuno.  
Sendas mi la mallongan leteron.  
Por esprimi mian deziron kaj sopiron.  
Blua luno kaj steloj ĉe la ĉielo -  
Reprezentantoj de mia koro kaj okuloj -  
Ĉiuhore kaj ĉiuminute vin akompanas,  
Esperas, ke vi ĉiam estos gaja.



*Karaj legantoj! Jam konata al vi aŭtoro el Francio Johan'-Luko Tortel proponas al vi plibonigi la gramatikajn sciojn, analizante proverbojn.*

## Proverboj por komencantoj

Johan'-Luko Tortel | Le Belvedere, Francio]

Ĉu ni, komencantoj, scias, kio estas proverbo? Zamenhof diris: "Popol-diro" en sia Dua Libro de l' lingvo internacia.

"Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" klarigas: Popola maksimumo (ver-aĵo pri la vivo).

La patro de Zamenhof, Marko, verkis libron de proverboj. Ludoviko tradukis ilin en Esperanton. Ĝi nom-iĝas: "La Proverbaro", kaj entenas preskaŭ tri mil proverbojn. Proverbo ofte diras banalajon. Sed ĝia intereso kuŝas en ĝia sprita maniero paroli. En Esperanto tiu lerta parol-maniero estas grava, ĉar ĝi prezentas pretajn esprimojn por multaj okazoj de la vivo ĉiu-taga. Tiaj vort-aranĝoj ofte mankas al ni, kiam ni volas diri viglan frazeton. Ŝajnas, kvazaŭ nia Esperanto ne havus trafajn, rapidajn, densajn dirojn. Ne, ili jam ekzistas en nia Proverbaro!

Ni do kune legu kelkajn el tiuj popol-diroj; ni tiel "trafos du celojn per unu ŝtono": ni lernos pretajn eldirojn kaj distre re-vizitos nian gramatikon (regul-aro por ĝuste uzi nian lingvon). Ek !



### Estas tubero en la afero <sup>(536)</sup>

signifas: jen estas problemo en tiu nia nun-a faro.

Estas foje signifas: = (egalas). Sed ĉi tie ĝi signifas: trov-iĝas aŭ situas.

La indikas, ke ne estas iu ajn afero, sed precize tiu, pri kiu ni nun zorgas. La estas kvazaŭ mal-forta tiu ĉi.

Ni memoras, ke -O fino indikas nomon, ĉu ne? Tio estas etiketo por indiki homon, beston, aĵon, ideon...

Ni ankaŭ scias, ke -AS indikas nun-an agon aŭ staton.

TubERO, afERO: sama fino, agrabla ripeto por la (tiu nia) orelo. Tio estas rimo, ofta en proverboj. Ĉi tie ĝi estas interna rimo, ĉar unu sono estas interne de la frazo.

### Printempo semas, aŭtuno rikoltas <sup>(2093)</sup>

signifas: la laboro kaj lernado de nia juna aĝo utilos al ni en niaj postaj jaroj.

La ne estas bezon-ata antaŭ *printempo* kaj *aŭtuno*, ĉar estas nur unu printempo, unu aŭtuno (sed ni dirus: *La printempo de la jaro 2005 estis mal-varma*). Same la ne estas bezonata antaŭ persona nomo: Doktoro Zamenhof, ĉar estas nur unu.

### Akvo kaj pano servas al sano <sup>(5)</sup>

De-nove la ne estas bezonata; ne temas pri preciza, sed pri ĝenerala akvo, pano aŭ sano.



La diferenco inter **por** kaj **pro** estas tio, ke **por** esprimas celon (por plezuro, por la vivo, por studoj, ktp); **pro** esprimas kaŭzon (pro ĵaluzo, pro malsaniĝo, pro grava kaŭzo, pro tio ke = ĉar). Vi povas vidi tiun diferencan ankaŭ en sekvaj ekzemploj:

*La homoj aĉetas multe da objektoj por Kristnasko.*

*Tiun pupon li aĉetis por sia filino.*

*Por vi mi povas fari ĉion!*

*Pro Kristnasko la bankoj estas fermitaj.*

*Pro sia malsana filino li havas multe da zorgoj.*

*Pro vi mi malfruis al la vagonaro.*

**Por** estas sufiĉe proksima al **al** (kiu esprimas direkton): *Mi mendis kafon por vi. Mi mendis kafon al vi.* La diferenco estas ja tre malgranda, kaj anstataŭ **por** oni povas preskaŭ same bone diri **al** kaj male. Sed ne ĉiam! Ekzemple, la sekvantaj du frazoj tute ne estas egalaj: *Mi skribis por vi. Mi skribis al vi.* Same ne intermiksi **por** kaj **al** en la frazo: *La homoj aĉetas al si multe da objektoj por Kristnasko.*

**Por** rilatas pli la estontecon ol la pasintecon; **pro**, kontraŭe, - la pasintecon. Tial **por** kelkfoje anstataŭas aŭ estas anstataŭata de **al**, ekzemple: *kolekti monon por (al) mizeruloj, dankplena por (al) iu.* Aliparte, **pro** iafloje estas anstataŭata de **de**, ekzemple: *ruĝiĝi pro (de) honto.*

*Danki por aŭ pro? Danki pro* estas pli oportuna en poezio, ĉar oni povas mallongigi: *pro!*, dum oni ne povas mallongigi: *por!*

## Diversaj nuancoj, kiujn havas por:

1) Prezo por kiu oni aĉetas (abonas, mendas ktp) ion; kvanto, por kiu oni pagas (donas ktp) ion; kaj tempo, dum kiu io estas okazonta:

*Mi aĉetis florojn por du kronoj al (aŭ por) mia edzino.*

*La knabino petis ĉokoladon por kvindek kopekoj.*

*Mi pagis por la floroj (ne pro, ĉar la floroj estis ne kaŭzo, sed celo de mia aĉeto) du kronojn.*

*Oni dankis la prezidanton por (aŭ pro) lia energia laboro. Dankon por (aŭ pro) via interesa letero! Nia instruisto forveturis por kelkaj tagoj (= li forveturis kun la celo foresti kelkajn tagojn).*


2) Malo de **kontraŭ**: *Dudek kvin membroj voĉdonis por kaj nur dek voĉdonis kontraŭ la propono. Ĉiuj ĉeestantoj estis por fondo de la klubo.*

3) Post certaj verboj (voli, deziri, povi, devi, rajti, ordoni, promesi, permesi, komenci, fini, ĉesi, daŭri, lasi, igi, ŝajni, emi, ktp) nepre devas sekvi infinitivo senpere:

*Mi volas manĝi. La infanoj komencis ludi. Ĉu mi rajtas eniri? Ĉesu jam petoli! Mi ne emas labori hodiaŭ.*

Sed multaj aliaj verboj devas esti ligataj kun infinitivo per la prepozicio **por**: *Ĉu vi venis tien ĉi por dormi? La homo naskiĝis por labori, suferi kaj morti. Ili havas nenion por manĝi.*

Kun **pro** infinitivo ne estas uzebla. Oni devas substantivigi la verbon: *pro kurado* (ne pro kuri) *li laciĝis* (aŭ: *Pro tio, ke li kuris, li laciĝis*) *Mi malfruis pro la tagmanĝo.*



# AFORISMOJ

Esperantigis **Barinov Miĥail** [N.Omka, Rusio]

Feliĉa vivo ne ekzistas, ekzistas nur feliĉaj tagoj.

*A. Terje*



Kelkaj dekoj da Novaj jaroj faras homon maljuna.

*E. Krakij*



*NV*

Kalendaroj estas senkonkurencaj en la afero antaŭvidi estontecon.

*L. Ilumor*



Homoj senĉese pensas pri morgaŭa tago, kvazaŭ ili ne vivas, sed prepariĝas al la vivo.

*Seneko*



Novajoj estas jam delonge konataj aferoj, nur ili okazas ĉiam al novaj homoj.



Elspezi optimismon necesas ŝpareme, por ke ĝi ne elĉerpiĝu ĝis la jarfino.

*S. Jeji Lec*



Kiu ne scias, kien li iras, plej verŝajne venos ne tien.

*L. Piter*



Ripeti indas nur neripeteblan!

*L. Konopinjskij*




Se oni al mi diros, ke morgaŭ pereos la tuta mondo, mi tamen hodiaŭ plantos arbon.

*M. Luter*



Indikiloj de horloĝoj – estas du manoj, kiuj forprenas de ni tempon.

*G. Tanjĉik*



## Pri revoj kaj mirakloj

Selektis laŭ temo kaj esperantigis  
**Viktor Kudrjavcev**  
[Jekatrinburg, Rusio]

Revoj estas planoj en la kapo,  
sed planoj estas revoj sur  
papero.

*V. Ĝijeĉik*



Revi oni povas eĉ pri tio, pri kio  
estas malpermesata pensi.

*G. Malkin*

Se revi – do revi, ne limigante  
sin en io ajn...

*D. Rudij*



Homoj vizitas kinejon por  
spekti la saman revon por ĉiu.

*B. Bertaluci*



Nun pli ol revo el or' taŭgas la  
fer' de l' labor'!

*K. Kalocsay*



Tio, kion oni volas, ĉiam ŝajnas  
nepre bezonata.

*M. E-Eŝenbah*



Estu ĉio! Sed tamen io ne-  
sufiĉu!

*M. Ivaneckij*



Iluzioj, kiel la dentoj, malaperas  
kune kun travivitaj jaroj.

*S. Smith*



La mondo estas ne nur mirinda,  
ĝi estas eĉ pli mirinda, ol ni po-  
vas imagi!

*G. P. Dej*



Mirakloj ekzistas tie, kie oni  
kredas ilin, kaj ju pli forte oni  
kredas, des pli ofte ili okazas.

*D. Didro*

Kolektis kaj esperantigis **Andrej Starostin** [K-Uralskij, Rusio]

Esperantigis  
**Ŝilov Aleksandr** [Neftekamsk, Rusio]

### Konsiloj

Necesas eviti homojn, kiuj volas gloron kaj riĉon, por si, sed ne por vi.

\*

Estas tute facile trovi nigran katon en malluma ĉambro, se neatendite surpaŝi ties voston.

\*

### Reklamaj anoncoj

Geedziĝoj, funebraj ceremonioj.  
 Por la konstantaj klientoj – rabatoj.

\*

En nia vendejo vi trovos librojn por bretoj, bretojn por libroj....

\*

### Pedagogio

En Usona religiema familio filo petas la patron:

— Paĉjo, aĉetu por mi aŭton.

— Bone, - respondas tiu, - sed vi devas plenumi tri kondiĉojn: vi devas bone lerni, regule viziti preĝejon kaj fortondi vian hararon. Kaj tiam mi donacos al via 16-jariĝo aŭton.

Pasis tempo...

— Paĉjo, morgaŭ mi havas 16 jarojn, mi bone lernis kaj regule vizitis preĝejon...

— Sed vi ne fortondis vian hararon.

— Mi vizitis preĝejon kaj tie vidis, ke Jesuo Kristo kaj aliaj sanktuloj portis longajn harojn...

— Kaj ĉu, ili veturis per aŭtoj?

### Ĉe tajloro

— Ĉu vi povus kudri por mi kostumon kiu havas koloron de kafo kun bolanta lakto?

— Ĉu vi deziras kun sukero aŭ sen...?

\*

### Logiko

— Mi havas du novaĵojn, bonan kaj malbonan.

— Diru dekomence la bonan...

— La bona novaĵo konsistas en tio, ke mi ne diros al vi la malbonan..

— Kaj la malbona?

— La malbona — ke mi ne diros al vi la bonan!

\*

### Testamento

Unu advokato skribis testamenton, en kiu li lasis tutan sian havaĵon al stultuloj kaj frenezuloj: “De ili mi ĝin ricevis, kaj al ili redonas”.

\*

### En bazaro

Sidas viro ĉe bazaro, vendas terpomojn. Venas aĉetanto kaj demandas:

— Ĉu estas bonaj viaj terpomoj?

— Tute ne, estas perfekta aĉaĵo...

— Se ili estas aĉaĵ, kial vi ilin vendas?

— Hmmm... Ĉu mi sola devas mangi ilin?

\*

### Forkuris el prizono

Juĝisto demandas ĉe kvar indianoj, kiuj forkuris el prizono.

— Rakontu, kiel vi forkuris el prizono?

— Sidis ni en prizono unu tagon, duan, trian... Al la kvara tago la indiano Akra Okulo rimarkis, ke unu el la muroj forestas...

\*

### Du amikinoj

— Ĉu vi edziniĝas pro mono?

— Tute ne. Mi eĉ ne scias, kiom da milionoj li havas...


\*

### En restoracio

Riĉa virino, evidente, posedantino de iu komerca entrepreno, sidas en luksa restoracio. Al ŝia tablo proksimiĝas eleganta viro kaj, dezirante konatiĝi, diras:

— Permesu proponi al vi mian kompanion.

— Pri kiu komerco okupiĝas via kompanio? – interesiĝas la virino.



**Kornjuhina Anna** [Barnaul, Rusio]



## Internacia Televido

*Flavio Rebelo, konata esperantisto, akademiano kaj entreprenisto el Brazilo iniciatis kaj efektivigis la plej sukcesan retan E-projekton "Ĝangalo". Multaj el vi evidente jam uzis ĝiajn servojn. Nova lia grandioza reta projekto "Internacia Televido" ĵus startis kaj funkcias jam kelkajn semajnojn. Vi povas spekti ĝin ĉe la adreso <http://internacia.tv>*

**La unua  
televidekanalo  
tute en Esperanto!**

## ... Mi komencis elpensi manierojn plibonigi la uzadon de la lingvo en la praktiko

*Flavio Rebelo rakontas al la legantoj de nia revuo pri siaj unuaj praktikaj paŝoj en Esperanto*




foto el la revuo "Esperanto"

**E**n 1992, kiam mi pretigis min al unujara vojaĝo al Eŭropo kaj Norda Afriko, pli specife al Kairo, en Egiptio, mi deziris scii plej bonajn manierojn por loĝi en la domo aŭ hotelo, aŭ en iu ajn gastejo kiel eble plej malmultekoste; kaj patrino mia, kaj eble kelkaj amikoj, sugestis pri iu skemo de esperantistoj en la tuta mondo. Do, mi komencis esplori la situacion. Mi vizitis la esperanto-klubon de mia urbo San-Paulo en Brazilo, kaj verdire la loko ne tre imponis min – estis tre simpla domo kun maljunuloj... ne alloga.

Sed mi almenaŭ aĉetis ekzempleron de "Pasporta Servo" kaj pretigis min por la vojaĝo.

En 1993 mi estis unu jaron for de mia hejmo kaj en Eŭropo precipe mi loĝis dum duonjaro, ĝis

julio, kaj poste dum ses monatoj mi loĝis en Kairo, Egiptio.

La celo de ĉi tiu vojaĝo estis lerni lingvojn kaj ankaŭ konatiĝi kun homoj en aliaj kontinentoj, precipe kun tiel nomataj "unua-mondanoj", ĉu ne? En Berlino mi havis la ŝancon uzi Esperanton, ĉar mi gastis ĉe unu franca esperantisto, kiu tiam loĝis en Berlino, kaj li estis tute neordinara esperantisto en senco, ke li havis grandan bibliotekon kun eble milo da esperanto-verkoj. Krome li havis tri kasedojn kaj eĉ unu KD (de "Kajto" - kaj tio en 1993!) – tio treege impresis min, multe pli, ol la Esperanto-klubo de San-Paulo, ĉar tiam mi konstatis, ke Esperanto vere funkcias kaj mi decidis lerni ĝin plene, kiam mi revenos al Brazilo.

En la komenco 1994 mi revenis al Brazilo kaj komencis tuj studi Esperanton, sed post kelkaj monatoj mi vidis, ke la afero pasis ne tiel bone, kiel mi volis, la disvolvigo de la lingvo ne sukcesis allogi min sufiĉe, do mi komencis elpensi manierojn plibonigi la uzadon de la lingvo en la praktiko. Mi lanĉis, do, Esperanto-lernejon, kaj tio estis tute profesia afero, kun pluraj klasĉambroj, videoĉambro kun bendoj kaj tiel plu, sed la afero bedaŭrinde fiaskis pro manko de lernantoj en San-Paulo.

Sed unu el miaj lernantoj diris, ke li povus eventuale helpi min... ke estus interese havi ret-portalon pri noticoj kaj amuzajoj kaj tiel plu en Esperanto. Kaj tiu mia lernanto, kiu estis specialisto pri informadiko, helpis al mi, kaj ni kune kreis "Ĝangalon". Nun li ne plu estas kun mi, li eĉ forlasis Esperanton, ĉar estis el tiuj komencantoj, kiuj lernis dum ses monatoj en la kurso kaj poste malaperis, sed intertempe li sukcesis helpi min kun la kreado de "Ĝangalo".

En la "Ĝangalo" vi trovos noticojn, artikolojn pri diversaj temoj, elŝutaĵojn, ligilojn, same kiel horoskopon, babilejon, forumon, veterprogonzon, serĉilon, voĉdonejon kaj multe pli...

## Novjaraj donacoj de Avo Frosto kaj Neĝulino!



La tasko estas  
tre simpla.  
Necesas diveni,  
kiun donacon sur la  
Novjara abio Avo-  
Frosto preparis al  
kiu el la gastoj de  
la novjara festo -  
Petruŝka,  
Leporeto,  
Ŝraŭbmajstro,  
Hundeto  
kaj Pinokkio?  
La respondojn  
kiel ĉiam ni  
atendas rete aŭ  
paper-poŝte.

Bill Thorne



RIMARO


ONO

admono  
balkono  
balono  
baritono  
bastono  
blazono  
butono  
ebono  
ekspono  
fasono  
fripono  
garnizono  
gazono  
gramofono  
ikono  
ĵargono  
ĵetono  
kaldrono  
kalsono  
kameleono  
kamiono  
kanjono  
kanono  
kantono  
kanzono  
kartono  
kimono  
kolono  
kotono  
krajono  
krono  
kupono  
leciono  
leksikono  
leono  
mentono  
pardono  
vagono

## Ĉe Novjara festotablo

Jelena, Viktoro kaj Andreo estas geamikoj. Ili decidis festi Novjaron kune. Post bongusta festa vespermanĝo ili ekvolis gustumi fruktojn. Sur la tablo estis pomoj, piroj kaj oranĝoj. Kiun frukton prenis ĉiu amiko, se estas konate, ke:

Jelena ne ŝatas pomojn, Viktoro ne ŝatas pirojn, Andreo ne ŝatas oranĝojn, Andreo kaj Viktoro preferas ne oranĝojn?



Solvojn de la enigmoj el la 5-a kaj la 6-a numeroj de "Komencanto"-2005 legu en la 1-a numero de 2006.

# Anoncetoj

# Informoj

# Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas studento kaj volas lerni Esperanton kaj ekkoni aliajn kulturojn **Int:** Lingvo, muziko, kulturoj.

*Bert Schouteten*

R. Verbeeckstraat 6,  
3012 WILSELE, Leuven

**Belgio**

[gitaarfreak@hotmail.com](mailto:gitaarfreak@hotmail.com)

Grupo el 12 studentoj (19-26-jaraj), pri informadiko, matematiko, historio, literaturo k.a. volas korespondi grupe – aŭ individue helpe de la gvidanto - kun simila studenta grupo.

Oslo

**Norvegio**

[leifarne@storset.net](mailto:leifarne@storset.net)

Mi estas 15-jara lemantino. Mi studas Esperanton kaj mi volas kontakti personojn el aliaj landoj. **Int:** muziko, lingvoj, legi.

*Raquel Madrid*

Comandante Izarduy 9B

3ºIzd

Vitoria

**Hispanio**

Mi estas 21-jara studento de matematiko. **Int:** scienco, vojaĝo, pentr-arto kaj moderna muziko.

*Levan Kapanadze*

7a mik. r. 2/117

Rustavi

**Kartvelio**

[lk\\_esp@mail.ru](mailto:lk_esp@mail.ru)

Mi estas 51-jara fraŭlo, muzikisto. **Int:** jazo, latinamerika kaj klasika muziko, biciklado, kuirado, legado (germ., esp., hisp.).

*Ludger Schmeink*

Werderstr 20,

D-45138, Essen

**Germanujo**

[ludger.schmeink@freenet.de](mailto:ludger.schmeink@freenet.de)

Mi estas militisto - mekanikisto pri aeroplanoj. **Int:** sporto, ekologiaj promenadoj, amikoj. Mi estas komencanto. Mi havas 23 jarojn. Mi tre ŝatas sporton, precipe futbalon kaj ekologiajn promenadojn. Mi tre ŝatas amikojn, studi kaj vojaĝi.

*s-ro Pacifisto Thiago*

Praça da Legalidade,

26 casa 01, Santa Cruz -

Rio de Janeiro,

BR-23550-070

**Brazilo**

Mi estas 69-jara kaj interesigas pri defendado de la medio, pri la maro kaj praktikas veltabulon. Mi ŝatus korespondi kun loĝantoj de Sud-Ameriko (aŭ Mez-Ameriko) sed skribu al mi eĉ se vi loĝas aliloke kaj vi certe ricevos respondon!!!


*Pjero Mens*

14 impasse Kerveleyen

Vian 29600

Plourin les Morlaix

**Francio**



## KOMENCANTO

## 2006

## Ne forgesu reaboni!

### Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

Se vi volas korespondi kun japano(in)oj, turmu vin kun konciza prezento al Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto:

Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo-to, 162-0042

**Japanio**

[jei@mre.biglobe.ne.jp](mailto:jei@mre.biglobe.ne.jp)

Mi estas 33-jara instruisto de franca kaj germana lingvoj. Mi eklernis Esperanton rete kaj ŝatus korespondi tra la mondo. Mi respondos kun vi rete aŭ papere. **Int:** lingvoj, muzikoj, edukado, aliaj kutimoj, kpt.

*Jean-Marc Leresche*

CH-2400 Le Locle,

Rue du Temple 7

Le Locle

**Svislando**

[leresche.j.m@blucwin.ch](mailto:leresche.j.m@blucwin.ch)

Mi estas 42-jara fraŭlo kaj volonte korespondos kun gesamideanoj, kiuj deziras amikecon pere de Esperanto - bela lingvo de paco kaj amikeco. Aĝo, sekso, raso, nacieco, religio ne gravas. **Int:** literaturo, traduk-arto, politiko, internaciaj aferoj, naturo, lingvoj, muziko, juraj aferoj, kulturo, kutimoj, tradicioj kaj vivmanieroj.

*Amiko Mondano*

**Usono**

[ifyourestyourust@yahoo.com](mailto:ifyourestyourust@yahoo.com)

Mi estas instruisto de la franca, ŝatus korespondi kun tiuj, kiuj aprezas babildadon, diskutadon ĉiuteme. Mi varme bonvenigos vian reagon. **Int:** lingvolemado, filozofio, foto, muziko, ktp...

*Henriel Fildilalao*

IAH 32 BIS Avaratsena

102 Ambohidadrapeto

Antananarivo

**Madagaskaro**

[fildilalao@yahoo.fr](mailto:fildilalao@yahoo.fr)

**komencanto@r66.ru**

**<http://Komencanto.narod.ru>**

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

